

El *Norda Prismo* : *Sentencoj* de Edwin de Kock kaj Leterkesto
Claude Gacond, 309-a radioprelego, 1969.09.10 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la kultura revuo *Norda Prismo* oni trovas abunde altnivelajn legaĵojn : ĉu novelojn, poemojn, tradukojn de rakontoj, kiuj koncernas la vivon en la nordaj landoj, ĉu dialogojn, kiujn bonege povus uzi la grupoj por siaj kunvenoj, ĉu plej neatenditajn erojn.

A.- Hodiaŭ ni legos al vi el la numero 2 de *Norda Prismo* jaro 1969 *sentencojn* de Edwin de Kock.

Cl. « *Hugh Macdiarmid* kritikas nian lingvon, pro tio, ke li ne trovas ajnan **vibran direkton** en Esperanto. En liaj propraj vortoj mi trovas nur la vibran direkton karakterizan de sensencaĵo. Se mi volus ŝajni same stulta, mi asertus, ke ankaŭ la angla senvvaloras, ĉar en ĝi **mi** ne rimarkas **vibran direkton**, ĉar ĝi estas – multe pli ol Esperanto – heterogena, kaj eĉ ĥaosa, miksaĵo de diversaj, laŭetose konfliktantaj lingvoj.

A.- *Poetoj asertantaj, ke estas pli facile fosi sulkon ol verki poemon, tre evidente neniam fosis sulkon. Homoj asertantaj, ke estas pli facile verki poemon ol fosi sulkon, tre evidente neniam verkis poemon.*

Cl.- *Nenio estas pli teda aŭ spiritalciga ol persono, kiu ĉiam grumbblas, krom eble persono, kiu ĉiam kaj ĉiuloke persistas ŝercadi.*

A.- *Nuntempe necesas impostoj kaj licencoj por preskaŭ ĉio surtere. Nur estas surprize, ke oni ankoraŭ ne bezonas pagi aer-imposton, kaj ke homoj ne devas porti licencon, kiel biciklo aŭ hundo, por la rajto aperi surstrate. Eble, tamen, estas pli civilizitaj landoj, kie tio jam okazas!*

Cl.- *La historio konsistas grandparte el rakontoj mise raportitaj de personoj aŭdinte ilin de homoj iom forgesemaj, por ne diri mensogaj, kiuj – antaŭ longa tempo – aŭskultis, per duona orelo, iun antaŭjuĝoplenan, fantazian novaĵon de tiuj, kiuj mem ĉeestis la koncernajn okazaĵojn, sed esti tro intime implikitaj en ili por vere scii pri kio temis.*

A.- *La peko estas varmega forno. Severe bruligita pro la tuŝo, diversaj homoj reagas diversmaniere. Multaj tamen tuŝados ĝin denove, kun la sama rezulto al siaj nudaj manoj. Pli multaj decidus estontece uzi gantojn. Nur tre malmultaj havas la simplan saĝon solvi la problemon per netuŝo de tiel danĝera objekto.*

Cl.- *La libero de la ĵurnalaro estas la libereco trompi la popolon. La ŝtata reguligo de la ĵurnalaro estas la transpreno de tiu libero fare de la registaro.*

A.- *La homo multon lernis el la instruoj de la historio : li lernis ĉiam denove ripeti la samajn erarojn. »*

Ni legis al vi kelkajn *sentencojn* de Edwin de Kock, kiujn ni ĉerpis el *Norda Prismo* jaro 1969, numero 2. Ni konsilas tiun revuon al la ŝatantoj pri beletro.

A.- Restas hodiaŭ iom da tempo por babiladi kun niaj geaŭdantoj.

Cl.- Meze de aŭgusto, per la perado de sinjoro Richard Barbezat en La Côte aux Féés, Svislando, salutis nin sinjoro Gaston Vidal en Chamalière, Francio. Sinjoro Richard Barbezat kaj sinjoro Gaston Vidal konatiĝis dum la ferioj. Ili estis najbaroj en kampingejo. Ĉar sinjoro Vidal regule aŭskultis esperantajn radio-elsendojn, estis por ili okazo diskuti pri la internacia lingvo kaj konstati, ke ni loĝas tre proskime de La Côte aux Féés, la vilaĝo de sinjoro Barbezat. Ni dankas sinjoron Vidal pro liaj salutoj, kiujn transdonis al ni telefone sinjoro Barbezat.

El *Norda Prismo* : *Sentencoj* de Edwin de Kock kaj Leterkesto
Claude Gacond, 309-a radioprelego, 1969.09.10 & 13

A.- Nia atento turniĝu momenton al la nordamerika kontinento. El Usono ni ricevis de sinjoro Conrad Fisher en Meadville, Pensilvanio, la tradukon en la angla lingvo de niaj radioprelegoj pri 80 jaroj de esperanta vivo. Tiu traduko baziĝis sur la artikoloj, kiuj aperis en *Sennaciulo*. Ni profitas atentigi la aŭdantojn de la landoj, kie la angla estas parolata, pri tiu angligo, kiu povas montriĝi utila en studentaj rondoj.

Cl.- Ni revenu al nia eŭropa kontinento. La intervjuoj de sinjoro Tibor Sekelj interesis plurajn geaŭdantojn. Sinjoro pastoro Hans-Jürg Kelpin en Dienstedt, Orienta Germanio, petis la sendon de pliaj informoj pri esperanto-turismo. Ni transdonas tiun peton al Tibor Sekelj mem.

A.- Sinjoro Walter Kaukal en Okcidenta Germanio ĝojis aŭdi la voĉon de Tibor Sekelj. Li raportas, ke « *en la iama Aŭstrio-Hungario antaŭ la unua mondmilito oni povis vidi ĉe la pordoj de la gastejoj kaj hoteloj ŝildojn **Esperanto parolata** kaj ke la konduktoroj en la internaciaj trajnoj portis sur la manumo de la uniformo rubandon kun la mencio **Esperanto**.* »

Cl.- Sinjoro Rudold Bartosch en Gross Siegharts, Aŭstrio, ŝatus havi kopion de tiuj intervjuoj de Tibor Sekelj. Kiel ni jam multfoje diris, ni ne konservas niajn registraĵojn. La aŭdantoj, kiuj deziras konservi radio-prelegojn devas mem registri ilin. Ni ofte konscias, ke ni devus povi konservi niajn radio-sonbendojn, por reaŭdigo, sed tio devigus munti sonbendtekon, kies utilo ne egalus al la elspezoj.

A.- El la Internacia Esperanto Feria Centro en Volparija, Jugoslavio, salutis dekkvino da geaŭdantoj el Svedio, Nederlando, Kanado, Aŭstrio, Francio, Belgio, Hungario, Pollando kaj Svislando.

Cl.- El la Universala Kongreso en Helsinki salutis pluraj geaŭdantoj. Ni profitas danki pri tiuj salutoj de feriantoj. Inter tiuj salutkartoj ni menciis tiun de Giovan'Antonio Pellanda, vicprezidanto de Ligo Internacia de Esperantistaj Blinduloj. Kiel vi scias, niaj elsendoj estas registrataj sur normalaj sonbendoj por la blinduloj, kiuj tiel povas cirkuligi sonbendan gazeton. Sinjoro Pellanda en Winterthur, Svislando, skribas el Helsinki : « *Dank'al viaj prelegoj, kiujn mi ricevas de kurtonda-radio, mi sukcesas plezurigi multajn nevidantojn de Sovetunio al Usono, de Norvegio al Hispanio. Diversaj el ili vizitas la 54-an Universalan Kongreson kiel mi tie ĉi en Helsinki.* »

A.- La venontan semajnon ni remalfermos nian leterkeston por fini tiun babiladon.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-